# VERDA FAMILIO 1/69

Neregula dulingva cirkulero por favorantoj de Internacia lingvo. Eldonas: Esperantista rondeto *ĉe* OB MěstNV Č.Dub. Redaktas: D-ro J.Hradil, Český Dub 137/III, distrikto Liberec, ČSSR.
Nepravidelný dvojjazyčný oběžník pro příznivce mezinárodního jazyka. Vydává: Esperantský kroužek při OB MěstNV Č.Dub. Rediguje Dr. J.Hradil, Český Dub 137/III,, okres Liberec, ČSSR

---

Enkonduke!

Ne ĉiu, kiu esprimis la intereson pri la Internacia lingvo restas daŭre aktiva samideano de tiu ĉi movado. La kaŭzoj estas diversaj: manko de daŭremo, de porstuda tempo, laboraj kaj familiaj devoj, neebleco de vojaĝado kaj manko de iniciato por eltrovi la eblecon de praktika uzado. Nia modesta cirkulero volas alporti freŝdatajn informojn per atingebla formo al ĉiuj interesuloj, servi al interkonatiĝo, lingva plibonigo kaj firmigo de la familio de favorantoj de la verda stelo. Ni ne volas konkurenci al malfacile eldonataj tutŝtataj gazetoj, sed sevis por plifirmigo de la rilatoj de samregionaj samideanoj kaj ĉefe al tiuj, kiuj ne havis eblecon perfekler ni la lingvon. Ni eldonas la cirkuleron en la plej modesta formo; ni tial ne multe elspezos, sed kontraŭe ni havos supozon pli longe ekzisti. Ni petas pri viaj kontribuaĵoj aŭ en Esperanto aŭ en ĉeĥa lingvo. Skribu pri novaĵoj el via rondeto, demandu pri kio vi interesas. Vi plivigligos nian cirkuleron, kiu volas pruvi al vi, ke ne estis senbezona lerni Esperanton.

STARTO estas nova cirkulero eldonata de preparkomitato de Ĉeĥa Esperanto-Asocio paralele kun slovaka Esperantisto Slovaka. (Komitataro: Tomáš Balda, Praha - Vladimír Bořánek, Plzeň -Drahomír Kočvara, Ostrava – Jaroslav Mařík, prezidanto, Praha – Pavel Sittauer, Třebíč – ing. František Sviták, Praha – Josef Vítek, Mělník – Josef Vondroušek, Brno)
Adresa redakce: STARTO, Esperanto, osvětový ústav Praha 2, Blanická 4.

Úvodem!

Ne každý, kdo projevil zájem o mezinárodní jazyk zůstane trvalým stoupencem tohoto hnutí. Příčin je mnoho: nedostatek vytrvalosti, času ke studiu, pracovní a rodinné povinnosti, nemožnost cestování a nedostatek iniativy k vyhledávání příležitosti k praktickému uplatnění. Náš skromný cirkulář chce přinášet čerstvé informace dostupnou formou všem zájemcům, sloužit vzájemnému seznámení, jazykovému zdokonalení a upevnění rodiny příznivců zelené hvězdy. Nechceme konkurovat obtížně vycházejícím celostátním časopisům, ale sloužit utužení vztahů okolních samideánů, hlavně těm, kteří neměli možnost dokonale se jazyku naučit. Vydáváme cirkulář nejskromnější formou; nebudeme proto mít velkou režii, ale zato předpoklad, že bychom mohli déle existovat. Prosíme o Vaše příspěvky ať v esperantu nebo v českém jazyce. Pište o novinkách z vašeho kroužku, ptejte se, co vás zajímá. Oživíte náš oběžník, který vám chce dokázat, že nebylo zbytečné se esperantu učit.

STARTO je nový cirkulář vydávaný přípravným výborem ČEA (Český esp.svaz) paralelně se slovenským Esperantisto Slovaka. (Složení výboru: Tomáš Balda, Praha - Vladimír Bořánek, Plzeň -Drahomír Kočvara, Ostrava – Jaroslav Mařík, prezidanto, Praha – Pavel Sittauer, Třebíč – ing. František Sviták, Praha – Josef Vítek, Mělník – Josef Vondroušek, Brno)
Adresa redakce: STARTO, Esperanto – Osvětový ústav, Praha 2, Blanická 4

Presnovaĵoj:
Oldřich Knichal: Kion vi ne scias pri esperanto. (Ĉeĥlingva informa broŝuro). 4.-Kčs

CHceš …? (Ĉu vi volas …?) Ĉeĥlingva afiŝo

Diplomoj (Ĉeĥlingvaj) pro frekventantoj de E-kursoj.
Pentraĵoj de francaj impresionistoj el kolekto de Nacia galerio en Prago, 10 paĝoj, 8 reproduktaĵoj, formato A/5, prezo 3.- Kčs, inda por viaj amikoj en Francio.
Invito al Ĉeĥoslovakio la plej nova, riĉe ilustrita publikaĵo en Esperanto, 100 p., formato A/5, prezo 13.- Kčs, valora donaco por eksterlandaj esperantistoj.
Ĉiuj novaĵojn mendu ĉe: Esperanto, osvětový ústav, Praha 2 – Vinohrady, Blanická ul. 4

-----------------------------------------------------------

Somera esp. tendaro (SET) en Lanĉov sur Vranov-lago (jam dekokfoje) havos denove du kursojn (13.-26.VII. kaj 27.VII.-9.VIII.69) kun kursoj por komencantoj, progresintoj kaj instruistoj. Informoj: Esperanta rondeto Třebíč. Jam ĉijare la SET ne kapablis aliĝi ĉiujn interesulojn kaj tial estis elektita ĉefe la junularo. Kiel helpi?

-----------------------------------------------------------

Seminario pri novaj lernolibroj de Esperanto estis aranĝita la 23-an kaj 24-an de novembro *68* en Prago. La rezulto estis la interkonsento kaj taskdivido por kolektiva kompilo de la nova lernolibro por komencantoj kaj progresintoj. Intertempe oni povas aĉeti la tre bonan vortaron de Hromada (Esp-ĉeĥan kaj ĉ-e kun konciza gramatika trarigardo de Dro Pumpr – vendejo KNIHA, Praha 2, Štěpánská 42) plue la lernolibron de Berka (EK Vsetín) kaj la ABC-lernolibro de Kilián (EK Třebíč).

Esperanta klubo en Třebíĉ per memhelpa adapto de la domo en la urba centro konstruis propran klubejon, kiu estis solene malfermita okaze la Zamenhof-memortago la 14an de decembro 1968. Ĉu oni ne povus sukcesi ankaŭ aliloke?

Tiskové novinky: Oldřich Kníchal: Co nevíte o esperantu. Informační brožurka o historii, organizaci a praktické aplikaci esperanta. Formát A/5, 50 stran, dvoubarevná obálka, cena 4.- Kčs
CHCEŠ ...? Propagační plakát pro E-kursy a kluby, moderní vkusná úprava, formát A/3, dvoubarevný tisk,universální použití, cena 0,50 Kčs za kus, nejmenší odběr 20 kusů, nad 100 kusů sleva až 50%.
Diplomy pro absolventy esperantských kursů, tištěné, formát A/4, cena 0,25 Kčs za kus.
Díla francouzských impresionistů ve sbírkách národní galerie v Praze, 10 stran, 8 reprodukcí, formát A/5, cena 3.- Kčs, vhodné pro vaše přátele ve Francii.
Invito al Ĉeĥoslovakio nejnovější bohatě ilustrovaná publikace v esperantu, 100 stran, formát A/5, cenný dárek pro zahraniční esperantisty.
Všechny novinky objednejte u: Esperanto, Osvětový ústav, Praha 2 – Vinohrady, Blanická ul. 2.

-----------------------------------------------------------

Letní esperantský tábor (SET) Lančov na Vranovském jezeře (již po osmnácté) bude mít opět dva běhy (13.-26.VII. A 27.VII.-9.VIII.69) s kursy pro začátečníky, pokročilé a učitele. Informace Esperantský kroužek Třebíč. SET již letos kapacitou nestačil a proto byl vybírána hlavně mládež. Jak pomoci?

-----------------------------------------------------------

Seminář o nových učebnicích esperanta se konal 23. a 24.listopadu v Praze. Výsledkem byla dohoda a rozvržení úkolů pro kolektivní sestavení nové učebnice pro začátečníky a pokročilé. Zatím je v trhu výborný slovník Esp-český a č-e se stručným přehledem Dr Pumpra, prodejna KNIHA, Praha 2, Štěpánská 42, dále Berkova učebnice (EK Vsetín) a ABC učebnice Kiliánova (EK Třebíč).
Esperantský klub v Třebíči svépomocnou adaptací objektu v centru města vybudoval vlastní klubovnu, která byla slavnostně otevřena v Zamenhofův pamětní den 14.XII.1968. Nešlo by to také jinde?

KNIHA, Praha 2, Štěpánská 42 – sendos al Vi la oferton de novaj esperantaĵoj (Havlíček Borovský: Bapto de Caro Vladimír, bildpublikaĵoj ktp.)

KNIHA, Praha 2, Štěpánská 42, zašle Vám nabídku esperantských novinek (Havlíček-Borovský: Křest sv.Vladimíra, obrazové publikace a j.)

Internacia renkonto de esperantistoj dum la Foiro en Leipzig estos sabate la 8-an de marto en „Klub de Inteligenz G.W.Leibnitz" Elstr. N.35. Interesuloj anoncu ĉe: Germana kulturligo-Esperanto, GDR 701 Leipzig, Käthe Kollwitz str. 115.

Mezinárodní setkání esprantistů na lipském veletrhu bude v sobotu 8.března v „Klub der Inteligenz G.W.Leibnitz" Elstr. N.35. Zájemci ohlašte se u: Germana kulturligo-Esperanto, GDR 701 Leipzig, Käthe Kollwitz str. 115.

LINGVA ANGULO:

1. Pasive: ekzercu tradukojn ambaŭflanke laŭ nia cirkulero en du kolonoj! Bone lernu novajn esprimojn!
2. Traduku kaj sendu kun 3 Kčs en poŝtmarkoj al nia adreso:

JAZYKOVÝ KOUTEK:

1. Pasivně: cvič překlady oboustranně podle našeho cirkuláře ve dvou sloupcích. Dobře se nauč novým výrazům!
2. Přelož a pošli s 3 Kčs ve známkách na naši adresu:

Kde bydlíte? Bydlím na vesnici. V poslední době jsem se neučil esperantu. Nechodím do kroužku, protože nemám čas. Večer musím pomáhat v domácnosti a učím se s dětmi. Také mám mnoho práce na zahradě. Jsem-li (když jsem) unaven, rád poslouchám hudbu. Rád bych si psal (pdm.způsob) se zahraničním přítelem. V poslední době se necítím dobře. Budu muset jít k lékaři.

Zájemci o jazykové zdokonalení – samouci! Napište
1. podle které učebnice studujete a ke které lekci jste došli,
2. zda máte slovník.

Pošleme Vám texty v českém jazyku v překladu, které vám po vypracování opravíme. Také Vám opravíme koncepty vašich dopisů. Zodpovíme vaše jednotlivé dotazy. Pošleme vám adresy, kam můžete korespondovat. Napište i v případě, že máte zájem o písemný kurs zcela od začátku. Zašlete vždy 3 Kčs ve známkách.

SE VI VOLAS REGULE RICEVI NIAN CIRKULERON (SENPAGE) SENDU VIAN ADRESON AL
CHCETE-LI PRAVIDELNĚ DOSTÁVAT NÁŠ CIRKULÁŘ (BEZPLATNĚ) POŠLETE VAŠI ADRESU NA
Esperantský kroužek OB Mst NV Český Dub, o. Liberec

La redaktejo deziras al la legantoj

FELIĈAN NOVAN JARON 1969 !

Ĝis reskribo!

Eble ni ĝisvivos eldonon de aliaj gazetoj, kiuj esprimus diversajn opiniojn kaj ideojn, tamen esperantajn, facile kompreneblajn al ĉiuj legantoj, buntigitaj per krucenigmoj, ŝercoj, desegnaĵoj, sportaj raportoj, anoncoj.

Snad se dožijeme vydání jiných časopisů, které by vyjadřovaly různá mínění a nápady, avšak esperantské, snadno srozumitelné všem čtenářům, zpestřené křížovkami, anekdotami, kresbami, sportovními zprávami, inserty.

Kelkaj <u>finlernintoj de korespondaj kursoj</u>: (absolventi)

Auská Květa
PedDr Iva Matulková
Houdová Věra
Macháčková Marie
Mrázek Martin
Cirga Jiří
Vaňková Lenka

Ni gratulas la finlernintojn kaj deziras al ili plenan aplikadon de nia Internacia Lingvo en ilia vivo kaj multajn pormovadajn sukcesojn! Ni esperas, ke ili trovos sian lokon en aktiveco de iliaj lokaj esperantaj kluboj.

<u>Lepruloj (malomocní) en Rumanio. (Sennaciulo 6/1990).</u> Verŝajne (Pravděpodobně) la lasta kolonio de lepruloj en Eŭropo estis malkovrita (objevena) en la vilaĝo Tichileste. Tiun kolonio malkovris belgaj transportistoj de helpmaterialo. Tiu ĉi loko ne troviĝas sur la geografia mapo. El kvindeko da malsanuloj, kelkaj estas ĉi tie naskitaj kaj ili ankaŭ ĉi tie mortos. Pro la malsano pluraj (mnozí) el ili estas tute difektitaj, blindaj, sen nazo, kun senfingraj manoj aŭ piedoj (bez prstů). La kolonio de lepruloj estiĝis (ustanovila se) en Ticheleste en la jaro 1877, 50 km de la urbo Tulceae apud Nigra Maro. La lepruloj produktas legomojn (zeleniny) kaj iom da kokidoj (kuřat), ĉar per tio, kion la ŝtato donis al ili, ili certe malsatmortus (zemřeli by hladem. La medikamentojn, kiuj almenaŭ haltigus (zadržely) la daŭran evoluon de la lepro, ili ne ricevadis. Ceausescu tute forlasis (opustil) la leprulojn. La plej aĝa inter ili estas 60-jara (naskiĝinta in Tichileste) kaj la plej juna 23-jara. Laŭ doktor G. Popa, en Rumanio troviĝas ankoraŭ kelkaj dekoj la lepruloj. La eksreĝimo (bývalý r.) de Ĉeausescu ĉiam kaŝis (skrýval) ekziston de tiu leprula vilaĝo, same kiel ĝi ĉiam asertis (ujišťoval), ke ne ekzistas aideso (AIDS) en Rumanio. Poste montriĝis, ke aideso infektis multajn infanojn, ĉefe en malsanulejoj kaj orfejoj (sirotčincích).

<u>El soveta humuro:</u> El ĵurnalo: Militinformo: „Hodiaŭ en la iran-iraka fronto estis mortigitaj 150 sovetiaj, 120 ĉinaj, 100 usonaj (amerických), 90 franciaj kaj 80 angliaj soldatoj, kaj krome unu irana soldato. Li plene tion meritis (zasloužil si to), ĉar oni ne devas (nesmí se) enmiksiĝi en alies (cizích) aferoj.

<u>Pipo:</u> Foje Stalin perdis sian pipon (dýmku). Li tuj telefonis al Berija: Berija, mia pipo perdiĝis.“ Post iom da tempo li trovis la pipon kaj denove (opět) telefonis al Berija: „Berija, la pipo estis trovita“. Sed Berija respondis: „Tro malfrue! Ses teroristoj jam konfesis! (už se přiznali)“